

PENSEO

N-ro 289

nov. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



rikoltoj

mi volis kapti mustelojn por mono
sed ĉiam ricevis nur ratojn.
mi deziris ĉirkaŭbraki primaveron pro
juneco
tamen falis en kaptilon de vintro senlima.



2012.12. 4 - 14

eskapo ne eblas

liberiginte el katenoj la piedojn kaj la
manojn,
tra monto kun rubusoj mi lepore kuras.
hundo persekutanta havas spritan nazon;
mi ĉiujn ĉifonaĵojn ĵetas kaj min trovas en
alies brakoj.

2012.12. 9 - 8

botelo drivanta

vitra botelo plenas de korp-ardo mia.
ĝin mi ĵetas en la pacan oceanon.
drivado estas serĉo kun aspiro.
kiam la varmo trafos similideanon?




2012.12.10

kia aŭspicio?

ĉevalo fortika flugas tra ĉielo la serena.
la blanko trenas pigojn kaj kolombojn.
min kapoperdan ĉase sekvas bovo koleranta.
ĉiu paŝo levas el tero brulbombojn.

2012.12.10 - 4

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Jubileo

Antaŭ cent dek jaroj, en Bulonjo,
ĉe kongreso de 'homoj kun homoj',
la unua verda familio
entuziasme plene ekfloris
pro l' rava lingvo internacia.

Lazar' Ludoviko Zamenhof,
(kvankam mondo sangas pro
perforto)
per la blovo de facila vento,
via luma ideal' traboris
la granitajn barojn de homsento.

Kun ĝoj', la centan UK-on ni festu!
Antaŭen sub la paca standardo,
ni iru laŭ la voj' de l' espero
kaj tra l' Tero ni tiel trumpetu:
Esperant' homigos la homaron!



Lillo/Francio, 30/07/2015.

Dio

Dio estas kaŭza verbo
de nord' al sud' de l' korp' mia.

Fonto, matrico, nutraĵo
de mia esto-kialo.

Nek sinjor', nek sinjorin';
neniun Di' punas, pardonas,
kvankam homoj al Di' donas
vizaĝon, ritojn, pasiojn.

Energio, kiu naskas
la senfinan harmonion,
muldanta formojn, esencojn:
ĉion je similec' dia.

Di' ne estas arestito
en fridaj tempoj el ŝtono:
fokuso de lumo daŭra,
dia Leĝo Poezias.



Juiz de Fora, 18/08/2015.

Mori (Usono)



AFORISMe(8)

Se homoj estus
samkiel kolomboj
nenie ekzistus bomboj,
nek soldataj tomboj.

Kiam mia viv'
atingas ĝis la fino
mi adiaŭos la vivon
per glaso da vino.

Post putriĝo de mia korp'
en la tombo
se mi devas reveni,
mi revenos kiel KOLOMBO..

Pli malgranda ol
NULO
estas ĵaluza ulo.

Homo sen homa moralo,
estas nur ia animalo.

Pli bonas esti
feliĉa malriĉulo
ol riĉa malfeliĉulo.

Homo ,
kiu havas nenion,
krom mono
ja estas la plej malriĉa
persono.



Sovaĝaj animaloj
estas kvazaŭ sanktuloj,
kompare al fi-homoj :
SANGO-SUĈANTAJ KULOJ.

Nov-kapitalismo
estas kanibalismo.

Homo kiu kredas
je milito kaj batal'
kiel ja diferencas
de l' sovaĝa animal'?


En la mezo de
sovaĝa ĝangalo,
pli ol ĉio ja valoras

ĉevalo.

Mondo prospera,
libera kaj bela
estas la mondo mia,
ideala.

La diferenco
Inter hom' kaj besto
ne devas esti
nur eleganta vesto.

Paŭlo Silas (Brazilo)



SILENTO

Mi surtretos la defion resti en silento.
Pli ol ploro, ol ĉagren' aŭdiĝos dum
momento...

Opini' de pens' pli taŭga volas ekparoli.
En duvoja interŝanĝo, devas nepre roli.
Babelturo hom-interna falas pli kaj pli.
Terenĵetas ĝin ŝtorm-forta, kirla opini'.
La neglekto de nenifaran' enfalas en vakuo.
Se enestas jam: en kion, la individuo?
Direktiĝos senmovec' al ag' urĝe iranta.
Molekulo malmergiĝas el enhav' giganta
Kaj ekkreskas, formon prenas, iĝas la enhavo.
La vulkano rezultig'as de komenca lafo.
Eta grajn' enmovadiĝas, branĉoj nun fariĝas,
Radikar' kaj trunk' dikegaj; suk', en ili, riĉas.
Eklezia sonoril' ne sonas sur la turo.
Kiu estas tiu, kiu tie ĝin stimulos
Rompi draste sian mult-jarmilan silentecon?
Da ĉi tiu ribelemo kulpas mi pro peco,
Ĉar decidis mi defii ĉion silentantan,
De la ĉelo necesata ĝis vivulo vanta.



Cezar (Germanujo)




Sola estas mi volonte

Sola estas mi volonte,
sed soleca tute ne.
Ĝisrevide postrenkonte
min ne kaptas plenda ve'.

Sola estas mi kun ĝojo,
sed soleca en amas',
se banalas asfaltvojo
aŭ en grego aŭ fatras'.

Sola estas mi sen timoj;
sed afliktas min solec'
en prizonoj kaj post limoj,
se pro frido mankas dec'.



ONIDIRO ONIDIRO

Pri vampiro onidiro
disvastiĝas dum rondiro,
mankas nur plu sanglampiro.

Ofte estas la fi-famo
nur tamburtruk' de reklamo,
ŝtorm' el akvoglasa dramo.

Edward Jaśkiewicz (Pollando)



ORO

Plej instiga por la koro
Estas sak' plena da oro

Kaj amikojn ja vi havas,
 Kiujn via oro ravas.
 Sed kontraŭe estas tiam,
 Se vi havas ĝin neniam.
 Oro, via ĉefa celo,
 Viv' sur tero - la ĉielo!
 En or' havas vi dolarojn
 Kaj sterlingojn, kaj dinarojn,
 Frankojn, rublojn, jenojn, vonojn,
 Markojn, zlotojn, levojn, kronojn.
 Ne bezonas vi laboron,
 Se vi havas tiun oron.
 En or' ĝojo estas vera
 Ne ĉiela sed la tera.
 Se or' tintas en la sako,
 Plena estas la stomako,
 Ĉiuj servas vin ĝentile,
 Sed ne dormas vi trankvile.
 Ĉar hienoj kaj ŝakaloj
 Trudigemaj animaloj
 Ĉirkaŭ vi cirkulos ĉiam,
 Do ripozos vi neniam.
 Onasis havante oron
 Ĉaspredis Ĵaklinan koron.
 Ĉi ekzemplo mondkonata
 Estas ja multobligata.
 Do per oro je la fino
 "mis" de l' mondo - belulino,
 Kiel ja ĉio atestas,
 Atingebla por ni estas.



Jadranka Miric (Serbujo)



Aŭtunas

Ora sunsubir'.
 Aŭtune finis birda,

al Sudo, forir'.

Aer' pli freŝas.
 Naturo koloriĝas.
 Brunas kaj ruĝas.

Homoj rikoltas
 maizon kaj fruktaron.
 Ĉaroj plenplenas.

Pluvas kaj fulmas.
 Tial homoj pli ofte
 ja, malvarmumas.

Iam nebulas.
 Ekstere malheliĝas.
 Nur montoj sunas.

Branĉaro nudas.
 Forta vento ĉapelojn
 dance forprenas.

Siv Burell (Svediujo)



Memorloko

Certaj lokoj je ĝusta sezon'
 memorojn vekas
 pri bataloj, paco kaj prizon',
 pri vivo kaj morto memoro eĥas
 pri perspektivoj nun kaj tiam
 kaj mi pensas pri eventoj iam.



penraĵo de la aŭtorino

Ni neniam finlaboris

niajn etajn projektojn.
 Ilin ni nur stapladis,
 ni serĉis pliajn aspektojn.
 Poste, tagon, vi malaperis,
 lasis min ĉion fini laŭ mia “bonspecon”.
 Mi vin enviis
 pro via senrespondeco.

Ni kunlaboru en sekva eston’
 tutcerte estos tiel!
 Dume ni pensu pri ideofont’
 kaj esploru sen urĝo — iel!
 Ni pensu pri eksperimentoj
 kunlaborante dum centoj.

Cruz e Souza* (1861-1898)



La ondoj

Age , reage , l' ondoj reprezentas ,
 laŭ l' mov' impeta ĉe l' diverĝo sia ,
 agon kaj reagon de l' viv' konscia
 per luktosistem' kiu evidentas .

Kontraŭaj elementoj tie entas ,
 egheroece en kunpel' defia :
 singulara lukt' transcendamfibia :
 ĉe l' hom' ide' , pasi' kiuj torentas .

Ondoj de l' maro , ondoj kiuj ravas ,
 en kiujn nervavibre sin malsavas
 la pensoj en descendo kvazaŭsonde .

Ondoj bluaj kaj verdaj, orkoloraj :
 maŭra fetiĉ' al mi ! Al vi , honoraj ,
 nepre ĉi versoj fluu kvazaŭsonde !

* *simbolisma poeto brazila*

Elportugaligis



Uel Roŝa (Brazilo)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO KVARA

Tiu ĉi homa mondo

§04-03

Yan He, kiu estis nomumita la instruisto de la kronprinco de la regno Wei, la plej aĝa filo de la duko Ling, venis al Qu Boyu por peti de tiu konsilon, dirante:

“Jen estas homo de sangavida naturo. Se mi lasos lin absurde agadi, tio endanĝerigos la regnon; se mi bridos lian konduton, tio endanĝerigos mian propran vivon. Li estas sufiĉe saĝa por vidi la kulpojn de aliaj, sed ne sufiĉe saĝa por vidi siajn proprajn kulpojn. Kion do mi faru kontraŭ li?”

“Bonan demandon vi metis!” diris Qu Boyu. “Estu singarda, estu zorgema kaj, antaŭ ĉio, korektu vian konduton! Montru vin prefere amika al li kaj samtempe donu al li gvidon. Kaj tamen, eĉ se vi agos tiamaniere, tiam estos por vi ne sen danĝero. Kiam vi vin montros amika al li, ne estu tro intima; kiam vi donos al li gvidon, ne evidentigu ĝin. Se vi estos tro intima kun li, vi povos ruiniĝi — katastrofo trafos vin. Se vi montros vian gvidon tro evidente, vi povos esti rigardata kiel ĉasanto de famo — sama danĝero por vi. Se li estos infaneca, ankaŭ vi devos aperi tia; se li estos senbrida, ankaŭ vi devos aperi tia. Tiamaniere vi paŝon post paŝo kondukos lin sur la ĝustan vojon.

“Ĉu vi konas la fablon pri manto? La manto levas siajn antaŭajn kruojn por haltigi

la alruliĝantan ĉaron, ne sciante, ke tio estas super sia povo — ĝi estas tro memfida. Estu singarda kaj vigle atentema! Se vi ofendos la kronprincon montrante vian talentan superecon, vi probable estos en danĝero.

“Ĉu vi scias, kiel laboras la tigro-bredanto? Li ne riskas nutri la tigron per vivaj bestoj timante, ke ĝi povus fariĝi feroca tiam, kiam ĝi mortigus la bestojn. Li ne riskas nutri la tigron per tutajn bestojn timante, ke ĝi fariĝus feroca tiam, kiam ĝi disŝirus la bestojn. Li scias, kiam la tigro estas malsata kaj kiam ĝi estas sata. Li bone scias ĝian ferocan naturon. La tigro estas de alia speco, ol la homo, tamen ĝi estas milda al sia bredanto, ĉar tiu sin adaptas al ĝia naturo. La tigro krueleĝas nur tiam, kiam oni iritas ĝin spite al ĝia naturo.

“Iam estis ĉeval-amanto, kiu kaptis la fekaĵon de sia ĉevalo per korbo kaj la urinon per konkego. Kiam tabano alflugis kaj haltis sur la ĉevalon, la ĉeval-amanto abrupte manfrapis ĝin. Timigite, la ĉevalo rompis la mordaĵon, la bridon kaj la brustorimenon. La ĉeval-amanto ja havis bonan intencon, sed li kaŭzis damaĝon. Ĉu ni povas ne esti singardaj?”

§04-04

Iu ĉarpentisto, kiu estis nomata Shi, estis survoje al la regno Qi. Kiam li atingis la lokon Quyuan, li vidis kverkon, kiu servis kiel vilaĝa dio. Ĝi estis tiel giganta, ke ĝi povis ŝirmi milojn da bovoj. Kun sia trunko de grandega ĉirkaŭmezuro kaj siaj alte kreskantaj branĉoj, ĝi staris super la ĉirkaŭaj montetoj. Pli ol dek ĝiaj branĉoj estis sufiĉe dikaj, por esti farataj en ŝipojn. La spektantoj svarmis kiel en bazono, sed la ĉarpentisto indiferece ne ĵetis eĉ unu rigardon al ĝi kaj iris pluen senhalte.

Sed lia metilernanto satrigardis ĝin kaj, kiam li kuratingis sian majstron, diris:

“De kiam mi prenis mian hakilon por lerni la metion sub vi, majstro, mi vidis neniun arbon tiel mirindan, kiel tiu ĉi. Sed vi ne ĵetas

eĉ unu rigardon al ĝi kaj marŝas pluen sen halti eĉ unu momenton. Kial do?”

“Forgesu ĝin!” diris Shi la ĉarpentisto. “Ne parolu pri ĝi! Ĝi estas senutila arbo. Ŝipo farita el ĝi povus sinki; ĉerko el ĝi povus rapide putri; vazo el ĝi povus fendiĝi; pordo el ĝi povus rezine ŝviti; kolonoj el ĝi povus esti vermaborita. La ligno estas senvalora kaj senutila. Jen kial ĝi staras tiele dum tiom da jaroj.”

Post kiam la ĉarpentisto revenis hejmen, la spirito de la kverko aperis en lia sonĝo, dirante:

“Kun kiuj aliaj arboj vi komparas min? Ĉu vi komparas min kun utilaj arboj? La kratago, pirujo, oranĝujo kaj pampelmusujo ĉiuj estas fruktaroj. La fruktoj estos ŝiritaj for de la arboj tuj kiam ili maturiĝos. Kaj tiam la arboj estos mistraktataj — iliaj dikaj branĉoj estos rompitaĵoj kaj iliaj maldikaj branĉoj estos torditaĵoj. Estas ilia utileco, kiu faras ilian vivon mizera. Jen kial ili ne povas ĝue vivi sian plenan vivdaŭron kaj mortas antaŭmaturan morton. Tiuj ĉi arboj mem altiras al si mondajn atencojn. La samo okazas al ĉiuj estaĵoj en la mondo. Dum longa tempo mi penas esti senutila. En pluraj okazoj mi povis apenaŭ min savi! Nun ke mi estas senutila, mia senutilo estas por mi la granda utilo. Se mi estus utila, kiel mi povus profiti de tiu ĉi granda utilo? Krome, vi kaj mi ambaŭ estas estaĵoj. Kiel do vi povas juĝi min tiele? Kiel senutila homo baldaŭ mortonta, kiel vi povus kompreni arbon senutilan?”

Kiam la ĉarpentisto vekigis kaj rakontis sian sonĝon al sia metilernanto, tiu diris:

“Se ĝi celas esti senutila, kial do ĝi servas kiel vilaĝa dio?”

“Fermu vian buŝon!” respondis lia majstro. “Ĉesu kun via sensencaĵo! Estas la vilaĝa dio, kiu prenas sur sin la formon de arbo. La arbo suferas insultojn kaj riproĉojn de tiuj, kiuj ĝin ne komprenas. Se ĝi ne estus la vilaĝa dio, ĝi certe jam estus hakfaligita!

Plie, la rimedo, kiun ĝi adoptas por sin protekti, estas tute malsama de tiu de aliaj arboj. Se vi juĝus ĝin laŭ la konvencioj, via kritiko ja estus tro absurda!”



Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Veĵdo (Ĉinujo)



Aŭtuna vento

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Vent’
aŭtuna el okcident’
alblovas
je nia kontent’.

Ĝi
alportas friskon al ni
donace
per dolĉa ebri’.

Al
kampoj la ora vual’
ŝutiĝas
en gracia fal’.

Por

bonrikolto kun favor’
ni penas
kampe kun fervor’.

Vent’
aŭtuna el okcident’
alblovas
je nia kontent’.
Ĝi
jen ĝojon sendas al ni
sincere
kun sia pasi’.

Jen
amon ni per brakumplen’
kolektas
en aŭtunfesten’.

Vent’
aŭtuna el okcident’
alblovas
je nia kontent’.

Ĝi
donas fruktojn per magi’
al arboj
en pompa seri’.

Dank’
al aŭtun’, estas ne manki’
de feliĉ’
jen en nia sang’.



**Dekses-Silabo*: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Lily (Ĉinujo)

Prete por amor'

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Jam nokte
jen en tikla hor'
mi soifas kareson
teneran vian, sinjor',
prete por amor'.

Mia mam'
je via dispon'
estas via ludilo,
ja pufa kiel balon',
sub via bezon'.

Mia buŝ'
tremas de aspir'
kaj atendas la vian,
vian kison per entir'
kun arda dezir'.

Mia korp'
tordiĝas de flam'
en profundo de l'koro,
brulas al vi mia am'
ja ardanta jam.

Mi sentas
jukon en la kor',
mi ja ne scias kial,
ĉiam kun amodolor'
ne plu sen pudor'.

Humidas
mia subo jen,
suko fluetas roje,
jam prete por am-festen'.
Ek! sen ajna ĝen'!

Sinjoro,
mi volas pete:

etendu vian manon,
min tuŝu impete
ekagu prete.

*Sopir-al-sudo: ĉina fiksfirma poemo de 35,77,5
silaboj, kun rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima)

Guozhu (Ĉinujo)



ETA BOVLO

En aŭtuno de 2015, mi loĝis en hospitalo du monatojn pro malsano. Dum mia restado en hospitalo, mi legis la artikolon *Fordrivis Ankaŭ Mia Infaneco* verkitan de s-ro Mu-xin. La frapfrazo ĉe la fino tiel tuŝis mian koron emocia, ke mi renomis ĝin *Eta Bovlo* kaj rakontis tion al mia nepo.

Tiu artikolo fakte estas tre mallonga. La bovlo estas senviva objekto. En la artikolo aperis kelkaj homoj, ĉiuj sen nomo. Tamen mi legis kun ĝuo. Jes, la eta bovlo estas senviva, tamen la homoj interligitaj de la eta bovlo ĉiuj havas sian vivon, travivaĵon kaj propran trajton.

Unue ni parolu pri la deveno de la eta bovlo. Ĝi estas donaco far veterana abato al la knabo — protagonisto de la rakonto.

La veterana abato estas sennoma, sed kun respektinda renomo: Tie estas 82 montoj, sur ĉiu monto estas templo. Kompreneble en ĉiu templo estas abato. La veterana abato ja estas ĉefa inter tiuj 82 abatoj.

Ankaŭ la infano estas sennoma. En la artikolo la knabo komencas lerni legi kaj redakti versparojn, de tio ni povas supozi, ke la aĝo de la knabo verŝajne estas 6- aŭ 7-jara. Ni povas facile imagi, ke parkeri vortojn el konfuceismaj klasikaĵoj estas ne-alloga tasko por infano en tia aĝo. Li preferas libere legi el nedevigaj aŭ malpermesitaj libroj (ekz-e kolektoj de Tang-poemoj aŭ Song-cioj) kaj el iu libro pri antikvaj porcelano li trovis du versojn

Kiel la blua ĉielo post pluvo,

farita ĝuste en tia koloro.

Li trovis la versojn gustoplenaj, facile memoreblaj kaj li parkeris tion.

La knabo-protagonisto en la artikolo tre ŝatas la etan bovlon. Li eĉ sentas ke manĝaĵo en tiu bovlo estas pli aroma. Ĉiufoje post manĝo la knabo mem lavas la bovlon ĉe fonto, pakis la bovlon per kotona papero, kaj metas ĝin ĉe kapkuseno en nokto. Li ne disiĝis kun la bovlo eĉ dum sia dormo. Foje la knabo laŭas la bovlon per la suprecitita versduo:

*Kiel la blua ĉielo post pluvo,
farita ĝuste en tia koloro.*

Aŭdinte tion, lia patrino diris: “Jes. Tio estas fama Jue-porcelano kaj tiu ĉi havas aparte bonan koloron. Nur la Ĉefabato povas havi tiel karan trezoron. Zorge tenu ĝin.” En la rakonto ankaŭ la patrino ĉiam restas sen-noma. Okzis io grava en la hejmo: La knabo devas kune kun sia patrino kaj multaj onkloj viziti al Moan-monto, kie sur la montsupro estas Templo nomata Dormanta Leono. Ili fari preĝ-kulton por praaŭ kaj tranoktis tie en la templo almenaŭ dum unu nokto.

Finiĝis la preĝado. Ĉiuj membroj de la familio foriris de la Templo Dormanta Leono kaj volas per ligna boato reveni hejmen en mateno. Estis brua mateno.

Kiam ĉiuj jam sidis en la boato kaj komenciĝos la veturo, la knabo subite rimarkis ke lia bovlo estis forgesita sur la monto. Kion fari? La patrino proponis ke ŝi aĉetu alian novan bovlon tute saman. Tamen la knabo ne konsentis.

En tiu momento, subite aperis juna boatisto (ankaŭ sen-noma) kiu brave saltis de la boato, kuregis al la monta supro kaj re-portis la bovlon por la knabo.

La boato multe ŝarĝita komencis veturi. La knabo sidas ĉe la rando. Li gaje ĉerpas kaj verŝas akvon de la rivero per la eta bovlo. Subite, je la levo de lia mano la eta bovlo falis en la fluo-mezon. Ĝi drivas sur la ondoj pli kaj pli foren (forrapidis tiel ankaŭ la infaneco de

la aŭtoro).

Nun ni jam aŭskultas la plejparton de la rakonto. La artikolo povas finiĝi.


La knabo raportis al sia patrino la okazintan akcidenton. La patrino konsole parolis al li: “Ne pensu plue,..... ĉar tia afero okzos ankoraŭ multe en via estonta vivo.”

La lasta frazo aŭdiĝas tre mallaŭte. Kion ĝi signifas? la aŭtoro skribas: “Ho, vere timinda antaŭdiro! Dum mia tuta vivo efektive okazis multe foje tiaj malfeliĉoj. Multe da aferoj, objektoj kaj homoj, centoble miloble pli karaj ol tiu eta bovlo, ĉio jam forpasis, eĉ frakasitaj.”

Legante ĝis tie, mi sentas veran animskuon. En la vivo de ĉiu homo forrapidis, unuj post aliaj, multaj karaj personoj kaj aferoj. Ili neniam revenos (ne nur via infaneco).

2015-10-26

Claude FARRÈRE (1876-1957)



LA VESPERMANGŬO DE LA BUSTOJ

(3)

«– Nu!... Miaj kompatindaj amikoj, kion vi volas?... Ni ne havas ĉiutage la ŝancon kiel la pasintan jaron!... Ne afliktiĝu!... Kun iom da imago, ni tamen sukcesos esti tiom gajaj...

«Kaj turnante sin al mi, dum li levis per ĝia malgranda anso la glason, kiu estis antaŭ li: “Je via sano, mia kara Mikelo!... Je nia sano al ĉiuj!... Kaj ĉiuj levis, dank'al iliaj malgrandaj ansoj, siajn glasojn per la fino de sia kroĉileto. Tiuj glasoj balanciĝis super la tablo de stranga maniero.

«Mia gastiganto daŭrigis: “Vi ne ŝajnas regi la situacion, mia kara Mikelo! Mi konis vin pli gaja! Pli bonhumora!... Ĉu ĉar ni estas tiel, ke tio malgajigas vin? Kion vi volas?... Oni estas kiel oni povas!... Sed necesas ridi... Ni ĉiuj,

esceptaj amikoj, kunvenas tie ĉi por festi la bonan tempon, kiam ni fariĝis tiel... Ĉu ne, sinjoroj el la Dafna?...

«“Tiam, kun ega suspiro la kapitano Mikelo daŭrigis rakonti, tiam...” Mia malnova kamarado eksplikis al mi, ke antaŭe sur la Dafna, pasaĝerŝipo kiu plenumis la servon en Ekstrema Oriento, ĉiuj tiuj uloj ŝippereis; ke la ŝipanaro forfuĝis sur la ŝalupoj, kaj tiuj malfeliĉuloj forfuĝis sur improvizita floso. Juna virino, admirinde bela, fraŭlino Madga, kiu perdis siajn gepatrojn en la katastrofo estis ankaŭ akceptita sur la floso. Ili troviĝis sur tiuj savaj tabuloj en tute dek tri, kiuj post tri tagoj elĉerpis ĉiujn siajn proviantojn, kaj post unu semajno estis malsatmortantaj. Tiam, kiel okazas en la kanzono, oni interkonsentis por loti "kiu estus manĝita..."

«“Sinjoroj, aldiris la kapitano Mikelo, tre serioza, tio estas aferoj, kiuj eble okazis plejofte ol oni rakontas ilin, ĉar la diskreta maro certe prisilentis iafoje tiujn digestojn...”

« Do sur la floso de la Dafna oni pretiĝis loti, kiam la voĉo de la kuracisto laŭtiĝis: “Gesinjoroj, diris la doktoro, en tiu ŝippereo, kiu forprenis ĉiujn niajn havaĵojn, mi sukcesis konservi mian ilujon kaj miajn hemostazajn pinĉilojn. Jen tio, kion mi proponas al vi: “Estas neutila, ke unu el ni riskas esti entute manĝita. Ni lotu unue brakon aŭ kruron laŭvole!... Poste morgaŭ ni vidos ĉu la fortuno ridetos al ni, eble velo montriĝos ĉe la horizonto...”

En tiu momento de la rakonto de la kapitano Mikelo, la kvar maljunaj harditaj maristoj, kiuj ĝis nun ne interrompis lin, ekkriis:

–Brave!... Brave!...

–Kiel brave? Pridemandis Mikelo kun la brovoj kuntiritaj...

–Nu, jes brave!... Via rakonto estas tre ŝerca... Oni laŭvice baldaŭ tranĉos al ĉiuj la brakojn kaj la kruojn... tio estas tre ŝerca!... sed tio tute ne estas terura!...

–Vere, vi trovas tion ŝerca, grumblis la

kapitano, kies ĉiuj haroj leviĝis! Nu, mi ĵuras al vi, ke se vi aŭdis tiun rakonton diritan meze de tiuj senkruruloj, kies okuloj brilis kiel ardaĵ braĝoj, vi trovos ĝin malpli ŝerca!... Kaj se vi vidis, kiel ili svingodancis sur siaj seĝoj!... Kaj kiom nerveze, tra la tablo, ili sin premis reciproke la kroĉiletojn, kun videbla ĝojo, kiun mi ne komprenis, kaj pro tio estis ankoraŭ pli terura!...

–Ne! Ne! Interrompis ankoraŭ unufoje Kamploko (tiu brava Kamploko), via rakonto tute ne estas terura... Ĝi estas ŝerca, ĉar ĝi estas simple logika! Ĉu vi volas, ke mi rakontas al vi la finon de via rakonto? Vi diros al mi, ĉu tio ne okazis tiel?... Sur sia floso, ili do lotis per pajleroj. La sorto trafis sur la plej bela... Sur unu kruo de fraŭlino Madga! Via amiko, la kapitano Gerardo, kiu estas galanta viro, donacis anstataŭ la sian, kaj poste finfine li tranĉiĝis al si la kvar membrojn, por ke fraŭlino Magda restu tute kompleta!...

–Jes, mia bravulo!... Jes, mia bravulo! Vi pravas! Tio okazis tiel, ekkriis la kapitano Mikelo, kiu ja draŝus tiujn kvar napokapojn, kiuj trovis lian rakonton ŝerca!... Jes! Kaj necesas aldoni... kiam oni parolis tranĉi la membrojn de fraŭlino Madga, ĉar restis nur tiuj ĉi kaj la brakoj – tiom utilaj – de la kuracisto, la kapitano Gerardo ankoraŭ kuraĝis tranĉigi al si, samnivele kun la trunko, la kompatindajn stumpojn, kiujn unua operacio nur lasis al li!

– Kaj fraŭlino Madga, deklaris Kaprusto, ne povis pli bone fari ol oferi al la kapitano sian manon, kiun li heroe permesis al ŝi konservi!

– Perfekte! Muĝis la kapitano en sia barbo, perfekte! Kaj vi trovas tion ŝerca!...

– Kaj ĉu ili manĝis la tuton kruda? Demandis la stulta Bagatelo.

La kapitano Mikelo frapis tiom egan pugnobaton sur la tablo, ke la subtasoj saltis kiel elestaj globetoj.

– Sufiĉas, li diris, silentu!... Nenion mi ankoraŭ diris al vi! Estas nun, ke tio tuĵ

fariĝos vere terura.

Kaj ĉar la kvar kunuloj sin rigardis reciproke ridetante, la kapitano Mikelo paliĝis. Vidante tion kaj komprenante, ke la afero tuj aĉiĝos, ili klinis la kapon al la tero...

– Jes, sinjoroj, reparolis Mikelo kun sia plej sombra mieno, la hororo estis, ke tiuj uloj, savitaj nur post unu monato, per ĉina velŝipeto, kiu forlasis ilin sur la bordo de Jangzio, kie ili disiĝis, la hororo estis, ke tiuj uloj konservis la guston de la homa karno! Kaj, reveninte en Eŭropon ili decidis kunveni unu fojon ĉiujare por refari, laŭeble, sian abomenan festenon! Ha! Sinjoroj, mi ne bezonis longan tempon por kompreni tion!...

«Unue okazis la akcepto malmulte entuziasma farita al iuj pladoj, kiujn S-ino Gerardo alportis mem sur la tablon. Kvankam ŝi aŭdacis aserti, cetere sufiĉe timide, ke ili estis preskaŭ tio, la gastoj troviĝis en akordo por ne gratuli ŝin. Solaj, la rostitaj tranĉaĵoj el tinuso estis akceptitaj sufiĉe favore, ĉar ili estis laŭ la terura esprimo de la kuracisto “bone sekcitaj”, kaj “se la gustamado ne estis plene kontentiga, la okuloj almenaŭ estis trompitaĵ”... Sed la trunkviro kun rondaj okulvitroj havis ĝeneralan sukceson deklarante, ke “tio ne valoris la tegmentiston!” Aŭdante tion mi sentis, ke mia sango retiriĝis el mia koro, obtuze tondris la kapitano Mikelo, ĉar mi memoris, ke la antaŭan jaron, je la sama epoko, tegmentisto mortis falante de tegmento, en la kvartalo de Arselano, kaj kiam oni retrovis lian korpon, mankis al ĝi unu brako!...

«Tiam!... Ho! Tiam!... Mi ne povis malhelpi min pensi pri la rolo, kiun mia bela najbarino necese rolis en tiu horora kaj kulinara dramo!... Mi rigardis al S-ino Gerardo, kaj mi rimarkis, ke ŝi ĵus surmetis denove siajn gantojn, kiuj supreniris ĝis ŝiaj ŝultroj... kaj ŝi ankaŭ haste ĵetis sur siaj ŝultroj kaptulon, kiu komplete kaŝis ilin al ĉiuj. Mia dekstra najbaro, kiu estis la kuracisto, kaj estis la nura el ĉiuj tiuj trunkviroj, kiu konservis manojn, surmetis li

ankaŭ denove siajn gantojn.

«Anstataŭ, ke mi provu, ne sukcesante cetere, trovi la kialon de tiu nova strangeco, mi certe pli bone farus sekvi la konsilon de S-ino Gerardo, kiun ŝi donis al mi en la komenco de tiu malbenita vespero, konsilo kiun ŝi ne refaris cetere, kaj kiu estis, ke mi ne malfruiĝas tie ĉi!...

«Post S-ino Gerardo, dum la unua parto de tiu mirinda festeno, montris al mi intereson, en kiu mi suspektis (mi ne konas la kialon) iom da kompatato, nun ŝi evitis rigardi al mi kaj vigle partoprenis al la plej terura konversacio, kiun mi aŭdis dum mia tuta vivo. Tiuj negravuloj, tre aktive kaj per mil bruoj de preniletoj, kunbatante siajn etajn glasojn kun ansoj, amare sin reproĉis aŭ vigle sin gratulis reciproke koncerne la guston, kiun ili havis! Horore! Lordo Vilmoro, kiu ĝis nun restis tiom deca, preskaŭ interbatalis per siaj kroĉiletoj kun la senkrurulo havante monoklon, ĉar tiu ĉi antaŭe trovis lin sur la floso tro ledmalmola. La ĉitiera dommastrino multe klopodis por kvietigi la etoson, replikante interalie al la monoklo-trunko – kiu devis esti, en la momento de la ŝippereo, bela junulo – ke ankaŭ ne estis tre agrabla trafi sur “tro juna besto”.

– Tio, ne sukcesis sin reteni la maljuna hardita maristo Doro, tio ankaŭ estas ankoraŭ amuza!...

Mi kredis, ke la kapitano Mikelo tuj kunprenis lin per la gorĝo; des pli ke la tri aliuloj ŝajnis delicumi de tute intima ĝojo, kaj aŭdigis etajn fantaziajn klukojn.

Estis apenaŭ se tiu brava kapitano sukcesis sin regi. Blovinte kiel foko, li diris al la nesingardema Doro:

– Sinjoro, vi posedas ankoraŭ viajn du brakojn, kaj mi tute ne deziras al vi, por ke vi trouvu tiun rakonton terura, ke vi perdis unu brakon, same kiel okazis al mi dum tiu nokto... La trunkviroj, sinjoro, multe drinkis. Pluraj saltis sur la tablon, ĉirkaŭ mi, kaj rigardis

